Aŭstraliaj Esperantistoj

Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 17/02/2024 sescentsepdekkvina eldono (unua eldono 26/09/2011)

Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .
Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://globalsouth.co/

Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

Esperanta Retradio

DONAS BONAN ĈIRKAŬ-5 MINUTAN AŬSKULTADON KAJ LEGADON ĈIUN TAGON
Ne estas faĉila elekti el al ĉiuj tagaj programoj Do alskultu ĉiujn.
Mikroorganismoj plibonigas la guston de teo 19a de februaro 2024 (*Roger Springer*)

La Manlia Esperanto-Klubo

La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin. Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno. La 18a de Febuaro estis la tria sabato.
Venis Roger, John, Chris kaj Ian 02 9976 6320 *Roger Springer*

ESPERANTO: TRE MOJOSA | INFORMON VI DEVUS SCII

Jen pri Esperanto:
https://www.youtube.com/watch?v=4xO-r5JOfAU

populara usona podkasto pri Esperanto
Amike, *Nicole Else* (En la angla)

Prelego: Malkovro de la Esperanto-literaturo

Estas pli ol 25 000 esperantaj libroj (originaloj kaj tradukoj) kaj pli ol cent regule distribuitaj Esperanto-revuoj. Ĉi tio estas malgraŭ tio, ke Esperanto ekzistas nur de ĉirkaŭ 130 jaroj. Tio estas proksimume la sama nombro kiel la tuta literaturo de Islando dum la lastaj 1000 jaroj.

En ĉi tiu renkontiĝo ni prezentos la historion kaj evoluon de la esperanta literaturo, de ĝiaj unuaj eldonaĵoj ĝis la starigo de la Esperanto-Vikipedio kun pli ol 200 000 artikoloj (la islanda havas 45 000).

Dum la paŭzo ni liveros senpagajn kafon, teon kaj esperantan muzikon kaj aŭtorolegadojn.

La gastiganto Rainer Kurz estas la eksprezidanto de Germana Esperanto-Asocio, nuntempe vizitanta Aŭstralion. Li komence lernis Esperanton dum 20 horoj ĝis li faris sian unuan esperantan vojaĝon (al Japanio). Intertempe li uzis Esperanton por vojaĝi al pli ol 40 landoj.

Tempo: Merkredo 21a de Februaro 2024, 15:00 - 17:00
Loko: Esperantodomo, 143 Lawson Street, Sidnejo/Aŭstralio
Registrado: https://www.meetup.com/de-DE/esperanto-in-sydney/events/299148287

Ĝis baldaŭ *Rainer Kurz*

Notu:- Tiun informon venis tro malfrue por antaŭe informi vin

Sed informo, kun fotoj, estos bonvenota por AE676 *Roger Springer*

kopirajta materialo

Jen ANTAŬPAROLO por la Marta eldono de Esperanto Sub la Suda Kruco

En 2023 abundis novaĵoj pri AI -Artifarita Intelegenteco. Laŭ la gazeto, *Nova Sciencisto*, en ĝia resumo de 2023, “OpenAI’sChatGPT” iĝis la plej rapide alprenita apo (APP) de iam ajn. Mia reago komenca estis tute malatenti la furoron. Sed mi baldaŭ konstatis, ke tio ne eblos. Mia edzino komencis uzi kaj esplori pri ĝi. Membro de AEA sendis artikolon verkitan de ĝi. Vi povas legi tion en la marta eldono de ESK, kaj poste la respondon kritikan de unu el niaj provlegantoj.

Sed AI ne temas nur pri verkado aŭ desegnado. AI pli kaj pli invadas nian privatecon, sciante ĉion pri ni kaj niaj organizoj. Oni ricevas celantajn reklamojn pri oniaj plej ŝatataj deziroj. Ŝerĉrimedoj povas trovi, ĉu oni uzas bildojn kun kopirajtoj, kaj se jes la agento por la posedantoj de tiu kopirajto sendas fakturon al vi. AEA jam spertis tion.

Ĉu oni timadus uzi ĝustajn nomojn, por eviti la eblecon, ke iu akuzos vin pri misuzo de kopirajta materialo? Ekzemple komence mi uzis la nomon *Nova Sciencisto,* anstataŭ la angla nomo de tiu gazeto. Ĉu Esperanto iĝos interreta sekreta lingvo, kaŝanta la verajn anglajn nomojn?

Do ĉu oni entuziasme brakumu la “kuraĝan novan mondon”, aŭ hezite eniru la “malsaĝan novan mondon?”

Terry Manley

Se vi deziras legi la artikolojn kaj plu, aliĝu al AEA kaj ricevu la belan gazeton, “Esperanto Sub la Suda Kruco”

La mondo estas tro dividita!

Ekde la komenco de vivo de homoj sur la Tero, neniu el ili agis ĝuste. Kaj eĉ hodiaŭ ili daŭrigas malami unu la alian, revas pri detruado de konstruaĵoj de siaj genajbaroj kaj kruelaj mortigoj de la filoj de tiuj samaj genajbaroj!

Tiuj, kiuj regas estas terure kruelaj. Ili tute ne scias kiel konduti. Dum la tuta tago ili sidas unu apud la alia kaj fumas venenajn cigarojn kaj trinkas la plej multekostajn kaj malbonajn trinkaĵojn. Ili manĝas la fimortigitajn kadavrojn de bestoj kiuj ne havis ŝancojn por defendi sin. Tiaj homoj gvidas nin. Ilia ŝatokupo estas militoj, sed ili mem estas sufiĉe ŝaĝaj por ne partopreni en ili. Sed ili estas ordonemaj. Ili ne pensas pri tio, ke unu el la leĝoj de ilia lando diras ke neniu rajtas mortigi iun ajn.

Treege ili ŝatas devigi la junulojn de sia lando forlasi siajn laborejojn kaj anstataŭ labori por gajni monon, ili devas eliri al aliaj landoj kaj detrui ties konstruaĵojn kaj mortigi kiom eble plej da homoj. Laŭ la leĝo de la lando en kiu ili vivas kaj pagas multege da mono el siaj salajroj al la regantoj, neniu rajtas mortigi kaj detrui ion ajn. Sed tiuj, kiuj detruas plej multe da konstruaĵoj kaj mortigas plej multe da homoj, ricevas medalojn ĉar ili estas konsiderataj herooj.

Nu, vi mem decIdu ĉu tio estas ĝusta?

La eraro, kiun la unuaj homoj faris estas ke ili stulte dividis la Teron inter si. Anstataŭ akcepti La teron kia ĝi estis, ili dividis ĝin inter si.

Do nun la homoj el la tuta mondo ne plu estas bonaj amikoj. Ili eĉ ne plu parolas kune ĉar nun ili ne plu komprenas unu la aliajn.

Venis iu saĝulo. Lia nomo estis Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Li tre bone komprenis la kaŭzon de la problemo. La tuta mondo konsistas el tro da nacioj, tial ankaŭ el tro da lingvoj. Por ke ĉiu povu kompreni kion diras alia, necesas ke ĉiu parolu la saman lingvon. Ĉar neniuj el la ekzistantaj lingvoj taŭgas por komuna lingvo, la inteligenta Lazaro, Ludoviko, Zamenhof sidiĝis kaj inventis facilan kaj bonegan lingvon taŭgan por la tuta mondo.

Nun eblas komuniki unu kun la aliaj, sed ankoraŭ ne kun ĉiuj. Ankoraŭ multaj homoj tute ne ŝatas la ideon, ke estas bone, se ni ĉiuj komprenas unu la aliajn. Ili ja tre amas militojn, murdadojn kaj detruadon de tio, kion havas iliaj najbaroj. Do ankaŭ ni normalaj homoj, ne povas senti nin sekuraj. Ni riskas problemojn kun la regantoj. Mi ankoraŭ memoras la respondon de unu tia homo, kiam mi iris al la regantejo de Danlando kaj klarigis al li, ke mi ne volas fariĝi soldato, mi deziras fine morti kun pura konscienco. Ĉu vi volas scii, kion li respondis? Li respondis "Vi devus esti pafmortigita". *Bob Felby*

3ZZZ En la elsendo de la 19a de februaro 2024 troviĝas pliaj informoj pri la kongreso en Aruŝo, informoj pri Henekeno, korea diasporo en Meksiko kaj Kubo , kaj konsiloj por teni la cerbon aktiva *Franciska Toubale*

Esperanta Dimanĉo

Rehejmiĝante el Kanbero, Sandor Horvath kaj Helen Palmer decidis halti ĉe ni je la rando de Melburno, en la verdaĵo. Pro la bela tago, suna sed ne tro varma, mi plezure malkovrigis al la gastoj la nekonstrueblan monteton en kiu trafluas la rivereto Olinda inter altaj arboj, malantaŭ nia domo. Ili eĉ admiris la akvofalon Horseshoe.

Helen rimarkis ankaŭ la Esperanto - averton sur nia leterkesto. Ni iom batalis dum la aŭkcio okazinta kadre de la somerkursaro en Ballarat, sed mi finfine akiris ĝin kaj ŝraŭbis ĝin al la leterkesto tiel ke ĉiu pasanto sciu ke ĉi tie Esperanto estas parolata. *Franciska Toubale*

Dankon al Helen kaj Sandor pro ilia vizito kiu gajigis la etoson de nia hejmoo dum ĉi tiu semajnfino

Esperanto-kunveno en Wyong

La Esperanto-klubo de la Centra Marbordo kunvenas la 3an dimanĉon de ĉiu monato (inter februaro kaj novembro) je 12:00, ĉe Wyong Milk Factory Tavern.

Dimanĉon, la 18an de februaro, 11 homoj kunvenis, inkluzive novan junan familion, Amy, Rob kaj ilia 2-jaraĝa filino, Lily. Amy eksplikis ke ŝi eklernis Esperanton nur malfrue pasintan jaron, per Duolingo. Ŝi diris ke ŝi komencis instrui la lingvon al Lily. Ni donis al Amy ekzempleron de *The Esperanto Teacher*, kaj informkarton pri Esperanto NSW. Ĉe la kunveno estis ankaŭ Max kaj liaj du filinoj Nim kaj Luka-Belle. Max parolas esperante kun ili ĉiutage, tamen pro timemo, dum la kunveno ili komprenis pli ol ili diris. Post ĝenerala babilado, ni ĉiuj ludis amuzan ludon per kiu ĉiu ricevis tri hazarde elektitajn kartojn, ĉiun kun bildo kaj vorto, kaj ni devis diri frazon, aŭ mallongan rakonton, uzante ĉiujn tri vortojn. *Jonathan*

Jonathan, Joanne, Amy kaj Lily, Max, Nim, Luka-Belle, Amy (Friedman), Alan (Mankanta por la foto: Wanda)

La unua parolado

Honorinda ĝenerala sekretario, honorindaj reprezentantoj de la nacioj de la Tero,

Mi dankas pro la ŝanco paroli antaŭ vi en la granda salono de Unuiĝintaj Nacioj pri niaj planoj por nia lando Aŭstralio kaj la cetera mondo.

Post pluraj jardekoj de kreskado mia partio fine atingis majoritaton kaj regos nian landon. Ni estas dankemaj, ke ni vivas en lando, kie mono ne estas la plej grava elemento en balotoj, kaj kie ĉiu civitano havas ne nur la ŝancon sed la devon voĉdoni. Kaj la diversaj partioj akceptas la rezultojn.

Multaj partioj post elektiĝo proklamas "novan aŭroron". Mi kredas, ke ni rajtas uzi tiun terminon, kaj kun pli granda pravo, kiel vi baldaŭ aŭdos.

Evidentiĝas, ke kreskadas streĉitecoj en la mondo, grandparte ĉar ŝtatestroj volas pugnobati sian bruston kaj aserti sian "rajton" esti grandpotenculoj. Kiel grandaj potencoj ilia lando "rajtas" postuli, ke kelkaj terstrioj apartenu al la "patrinlando", egale kion deziras la tieaj loĝantoj.

Tial ni planas fari Aŭstralion aŭtente sendependa kaj neŭtrala lando kaj doni al la mondo ekzemplon de matura agado. Ekde la koloniigo de nia kontinento antaŭ preskaŭ 250 jaroj ni neniam estis vere sendependaj.

Tio signifas, kompreneble, ke ni ne volas aparteni al la imperio de Usono. Ni havas kaj bonvenigas multspecajn kulturajn kontaktojn kun la homoj de tiu granda lando, sed ni nun postulas, ke ĝia registaro nuligu siajn militbazojn sur nia teritorio. Tio devus esti malgranda problemo, ĉar ĝi havas pli ol 800 bazojn en aliaj landoj. Ni volas resti en amikaj rilatoj kun la multaj talentaj homoj de Usono, sed iri laŭ nia propra politika vojo.

Ni absolute ne intencas alianciĝi kun malamikoj de Usono. Ni volas doni ekzemplon de tio, kion ni juĝas necesa por eviti la minacon de milito.

Tio ne signifas, ke ni ignoros la maljustan konduton de tiom da registaroj. Ni konstante kampanjos por homaj rajtoj ĉie, kaj ni komencos per tio, ke ni strebos kompensi pro la krimoj kontraŭ la originalaj loĝantoj de nia kontinento. Kaj ni draste ŝanĝos la hontindan traktadon de azilpetantoj far antaŭaj aŭstraliaj registaroj.

Ni konscias, ke militoj kaj minacoj de militoj estas tragedia distraĵo for de la veraj danĝeroj, kiujn la tuta homaro devas alfronti, nome la obscenaj diferencoj en vivniveloj inter landoj kaj interne de landoj, sed eĉ pli urĝe la danĝero, ke pro nia vivmaniero la planedo eventuale ĉesos esti vivejo por ni kaj aliaj specioj. Ni devas konfesi, ke ekstermado de bestoj kaj plantoj sur nia kontinento estas inter la plej malbonaj en la mondo. Ni intencas malpermesi ĉian formon de vivdetrua minado kaj uzi la inĝeniajn rimedojn de niaj kaj alilandaj specialistoj por evoluigi energifontojn, kiuj ne damaĝas la planedon. Ni dediĉos multe da mono al konservado de endanĝerigitaj specioj.

Ni agnoskas, ke en mondo tiel interligata estas bezonata internacia lingvo, kiu konkretigu la fakton, ke ni estas anoj de unu specio eĉ pli ol anoj de iu specifa nacio. Ĝis nun la angla parte plenumas tiun rolon, sed ni scias, ke la neregulaĵoj de la angla – kaj de ĉiu nacia lingvo – donas nemerititajn avantaĝojn al denaskaj parolantoj kaj malhelpas plenan partoprenon de la plimulto en tutglobaj aferoj. Do ni bonvenigas kampanjojn por antaŭenigi aŭtente neŭtralan internacian lingvon.

Fine ni stimulos kreskon de lokaj kooperativoj kaj aliaj alternativaj ekonomiaj sistemoj, tiel ke laboro estu rigardata kiel kontribuo al la komunumo, ne baze kiel maniero akiri sufiĉe da mono por vivteni sin.

Mi dankas pro via atenta aŭskultado. Mi estas certa, ke vi volas fari demandojn.

Trevor Steele,